

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la kvinan prelegon pri tiu temo.

Sub la direkto de Diderot kaj d'Alembert aperadis de 1751 ĝis 1772 la 28 volumoj de la granda franca enciklopedio (*Encyclopédie ou Dictionnaire raisonné des sciences, des arts et des métiers*). Se mi mencias tiun gravan verkaron, tio estas pro ĝia rolego sur la evoluon de la eŭropa penso ĉe la fino de la dekoka jarcento kaj dum la deknaŭa jarcento. Ĝi unue devis esti franca adapto de la angla enciklopedio (*Cyclopaedia, de Chambers*), sed Diderot ne kontentiĝis pri la rolo de tradukisto, li reverkis la tuton sur nova bazo kun la kunlaboro de la plej famaj tiamaj filozofoj kaj fakuloj. La originaleco de la franca enciklopedio troviĝas en ĝia provo klarigi la mondon per la karteizianismo (spirito de Descartes). Ĉiu aŭtoritato, ĉu eklezia, ĉu politika, ĉu eĉ kutime scienca, estas forĵetata je la nomo de la progreso kaj de la libero de la serĉado. La racio estas aplikata al ĉiuj problemoj, eĉ al la spiritaĵoj. La kredoj estas ofte konsiderataj kiel superstiĉoj, la fanatismoj de la dogmemuloj kondamnataj kiel danĝeraj fenomenoj. Tiu enciklopedio estas unu el la plej belaj floroj de la dekoka jarcento.

Koncerne nian temon, la iom-post-ioma humaniĝo de la militado, tiu enciklopedio ludis gravegan rolon. Ĝi alportas novajn argumentojn al la partizanoj de la homaranismo. Ĝi ekzemple presigas en 1777, ke « *la leĝo de la naturo limigas la rajton al militado* ». Ĝi precizigas : « *Laŭ la kutimoj la juro devas silenti, kiam la armiloj ekbruas, sed se la civila juro, la tribunalaĵoj propre al ĉiu ŝtato, nur povas funkcii dum pac-tempo, ne estas la samo kun la eternaj leĝoj, kiuj estas faritaj por ĉiuj epokoj, por ĉiuj popoloj. Tiuj leĝoj estas enskribitaj en la naturo.* »

Tiu aserto estas tre interesa. Ĝi donas racian kaj universalan bazon eksterreligian al la homrajtoj. Ili anoncas novan societeton. Ĝia universalismo estos la leĝo de la franca revolucio kaj fariĝos la komuna heredaĵo de la okcidenta mondo. Similaj diroj, kiel tiu, kiun mi ĵus legis, pro sia universalismo estas revoluciaj ankoraŭ en la mezo de la dudeka jarcento. Se la dokumentado de la franca enciklopedio rapide maljuniĝis, kiel por ĉiu simila verko, ĝia penso daŭre influadis tutajn generaciojn de la eŭropa intelektularo. Ĝi estis gvidilo por la serĉantoj, ŝlosilo, kiu malfermis la pordojn al novaj konceptoj.

La franca revolucio de 1789 kun la universalaj homrajtoj estas la normala konsekvenco de la kuraĝaj asertoj publikigitaj dum pli ol dudek jaroj en tiu verkado, tio malgraŭ la plej diversaj kontraŭstaroj. Ni eĉ povas diri, ke la publikigo en Ĝenevo de tiu enciklopedio estis por la reĝa kaj feodala reĝimo la plej granda ekbato kaj samtempe unu el la grandaj venkoj de la homarana spirito sur la dogmatismo.

En tiu epoko la mondo vivas metamorfozon, kiu estas la rezulto de la dinamismo de la penso de la filozofoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj. En 1776 estas proklamita la Deklaracio de Sendependeco en Usono, kaj dum la postaj jaroj, de 1777 ĝis 1784 ses usonaj ŝtatoj adoptas en sia konstitucio deklaraĵojn pri homrajtoj, kiuj donas ekvivon al la principoj karaj al Voltaire, Rousseau, Montesquieu, Diderot kaj d'Alembert, por citi nur la francajn filozofojn kaj heredas principojn famiĝintaj en la anglajn landojn, tiujn, kiuj troviĝas en la *Bill of Right* (tiuj riĉaj anglaj konstituciaj tekstoj).

Kiel kronado al tiuj proklamoj sin prezentas la deklaro pri la universalaj homrajtoj de la franca revolucio. La ideo pri justeco, egaleco de ĉiuj homoj antaŭ la juro, penslibero, la kondamno de la sklavigo, la individua libereco de la civitano, ĉiuj tiuj grandaj principoj, kiujn la franca revolucio proklamis, fariĝis heredaĵo komuna al ĉiam pli da nacioj. La franca revolucio okupas gravegan lokon en la historio de la internacia politika juro.

La korolario al tiuj grandaj principoj estas, en la penso de la francaj revoluciuloj, la universala paco. Malfeliĉe tiu optimista kaj idealema pacismo koliziis kun realaĵoj. Ĝi tiam ŝanĝiĝis en atakemo multe plu danĝera ol la reĝaj kaj feodalaj konceptoj de la militado.

La tuta nacio estis mobilizata por la savo de la revolucio. Rekrutenskrivo, deviga militservo, ara varbado, rekvizicio de ĉiuj vivrimedoj, ĉu materiaj, moralaj, intelektaj, pasiaj, jen ekstrovoj de tiu revolucio. Tiuj rimedoj montriĝis tiel efikaj kaj kondukis Francion al tielaj triumfoj, ke la aliaj eŭropaj potencoj, por sin savi de la franca imperiismo, devis imiti ĝin plej detale. Tiel komenciĝis la erao de la furiozaj militoj, kiuj daŭre disŝiroj la modernan mondon.

La batalojn de dungsoldatoj anstataŭas la svarmo-militoj. Tiu plilarĝiĝo de la militado kreos bezonojn, kies ŝarĝon devos asekuri la registaroj : la sanitaraj servoj de la armeoj estos pro tio rapide superŝutitaj. Tiam la privata kompatemo devos interveni. Tiel sin prezentas la situacio, kiu anoncas kaj favoras la naskiĝon de Ruĝa Kruco.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-